# EKO 2023

Pensu globe, Agu loke! Por la Landa kaj Faka Laboro

Nia aganto pri instruado kaj progreso

Jen la plej gravaj partneroj de la EKO-komunikoj


**EKO 2023 / 58. Oktobro 12, 2023**

**Kun partneroj UEA, ILEI, IFEF, UMEA, IKEF, LIBE kaj ELF-AREK**

**Kunlaborantoj: Rob Moerbeek, Elda Doerfler. Tria kontrolanto dezirata.**

**Pezo: Word nur teksto: 40 KB; Ĝia sveltigita PDF: 338 KB. Sume: KB 370**


## La retejo de ILEI estas nun seslingva

Estrarano de ILEI intervenis por kunlabore kun prizorganto de la retejo aperigi bazajn tekstojn pri Esperanto kaj la agado de ILEI en ses naciaj lingvoj: la angla, ĉina, franca, araba, hispana kaj rusa (la oficialaj lingvoj de Unuiĝintaj Nacioj). Ĝis nun la retejo estis preskaŭ nur Esperant-lingva.




## Senegalo: post malpaco al revivigo de agado

Esperanto-agadoj estis tre malriĉaj en Senegalo dum monato pro soci-politikaj eventoj en la lando ĉefe en la ĉefurbo Dakaro. Feliĉe kvieto revenis poste, tio permesis al ni organizi distancajn kursojn per vatcapo, ĉiusemajne: teoriaj kursoj (de Kossi WOUDJI) kaj diskurondoj inter retkonektitaj membroj (gvidataj de Lafi Charles DIATTA). Preciziginde: temas pri kursoj por progresantoj kaj komencintoj.

Lafi Charles DIATTA

## Esperantistoj kunvenos en la ĉefurbo

En Togolando plu okazas preparoj por renkontiĝo de lomeaj esperantistoj, en salono de la universitata centro St Jean de Lomeo, en oktobro 2023. La renkontiĝo, organizita kun helpo de Agado por la Progresigo de Esperanto en Togolando (APETO), celas kunhavigi spertojn kaj fotojn de mia vojaĝo al la ĉi-jaraj UK en Torino, kaj ILEI- kaj TEJO-kongresoj en Lignano,Italio kaj diskutigi ĝisdatigon pri agadcelo de APETO por la jaro. Okazos instigo al komencantoj partoprenantaj en la vatsapaj kursoj «Espéranto pour débutants» por parole praktiki la lingvon publike.

Ĉirkaŭ 15 diversnivelaj esperantistoj estas atendataj en la renkontiĝo. Ili interŝanĝos spertojn por konstrui agadrilatojn kun ekstermovadaj organizoj, pri vizitplano al izolitaj esperantistoj en la nordo de Togolando, por ke ili ne sentu sin solaj. Plano estas por ĉeesta instrusesio meze de decembro 2023. Tiu sesio finiĝos per kuncelebrado de la festotago de Zamenhof fare de la kursanoj. Kelkaj instrumaterialoj de APETO, nome etaj filmetoj daŭre aldoniĝas kaj afiŝeblas ĉe la jutuba kanalo: https://www.youtube.com/@afrikabulteno8906.

Nepre aboni al la kanalo por ricevi akurate informojn pri niaj freŝdataj enjutubigaĵoj. Intertempe ni komencis produkti surloke inform-materialojn, i.a kalendaretojn, glumarkojn por amasdisdonado. APETO volonte donacos ekzemplerojn al kluboj, asocioj, unuopuloj por ilia informagado, se ili mem kovros la sendokoston de Lomeo.

Laŭ komuniko de Adjévi Adjé

## Poemo de Marjorie Boulton en muzika versio

Tion prizorgis la Brazila Kolekto, kiu regule aperigas muzikajn programerojn:

https://www.brazilakolekto.com/2023/10/hejmo.html

## Pri la Esperanto-arbaro en Zaozhuang, Shandong, Ĉinio

La lastan tagon de septembro 2023, anoj de la Shandong-a Esperanto-Klubo vizitis la Esperanto-Arbaron starigitan de samideano Sun Shoude en la urbo Zaozhuang. La celo de la vizito estis duobla. De unu flanko, temis pri regula grupa agado por aldoni memor-platojn al arboj donacitaj de samideanoj de la tuta mondo por memori forpasintajn esperantistojn aŭ celebri internacian amikecon, la stelon de la espero, gravajn datrevenojn aŭ esperantajn organizojn. Due estis ŝanco por klubanoj renkontiĝi por la mez-aŭtuna festo en bonveniga loko, kie oni povas promeni inter arboj plenplenaj je maturaj juglandoj, pometoj, granatoj aŭ persimonoj kaj libere preni ilin rekte de la branĉoj. Ni sidis ekstere sub juglandarboj por manĝi kaj babili kune. La ekskurso estis tre plaĉa. Mi ekveturis el la Zaozhuang-universitato per aŭtobuso plenplena je gestudentoj hejmenirantaj aŭ vojaĝemaj por la nacia festo. Ĉe la urbo afable atendis min kun sia aŭtomobilo S-ro Semio (Sun Minĝiao), kiu havis gravan konsilan rolon en la realigado de la Esperanto-Arbaro.



Sendis: Alessandra Madella

## Pakistana revuo

'Nia Esperanto', revuo de Multana Esperanto-Rondo (MER), aperigis sian oktobran numeron. Krom papera revuo, oni ankaŭ faras retan revuon en formato PDF.

Abonprezo por 6 retaj mumeroj (julio-dec. 2023) kaj 8 malnovaj numeroj (jan-aŭg 2021) estas €3 al UEA-konto: mero-t) kaj bv.informi al saluton123@yahoo.com

Jawaid Eahsan. Ĝen. Sekr. de MER

## Facilaj artikoloj – rekomendu ilin al viaj kursanoj!

https://uea.facila.org/artikoloj/tra-la-reto/esperanto-nova%C4%B5oj-en-telegramo-r390/

https://uea.facila.org/artikoloj/literaturo/la-fi%C5%9Dkaptisto-r391/

## EKO-komunikoj serĉas novan lingvan kontroliston

EKO tre bedaŭrinde devas rezigni pri unu lingva kontrolisto, Gbeglo Koffi el Togolando, pro tro malagrablaj mesaĝoj pri la afrika agado. Kiel lingva kontrolisto, li noble servis tra la jaroj por kiu li meritas kaj de mi ricevas grandan dankon. EKO provis doni al li rolon en la ĉefflua movado en espero de pli bona rilato. Sed vane. Sekve ni nun serĉas iun, por ke la EKO-komunikoj havu daŭre tri kontrolantojn. Bonas tri, ĉar regule unu rimarkas ion, kion la aliaj du ne rimarkas.

## Oficiala aldono al la Universala Vortaro

En septembro 2023 la Akademio aprobis la 10-an Oficialan Aldonon al la Universala Vortaro, kun 420 novaj radikoj kaj 832 novaj vortoj aŭ plurvortaj terminoj kaj iliaj difinoj. Voĉdonis 41 akademianoj el 45 (91%), 32 aprobis (78%), 4 voĉdonis kontraŭ kaj 5 sindetenis. *Libera Folio* publikigas la plenan tekston.

La unua renkonto inter esperantistoj tre ofte komenciĝas per interŝanĝo de informoj pri la lokoj, kie ili kaj iliaj familianoj loĝas aŭ naskiĝis, pri ilia genta aŭ landa aparteno, kaj pri la lingvoj, kiujn ili lernis denaske aŭ nun scipovas paroli. Surbaze de tiu realo povas ŝajni surpriza la fakto, ke la Universala Vortaro enhavas relative malmulte da propraj nomoj pri geografio, kaj ke ĝia paletro de nomoj por gentoj kaj lingvoj estas ankoraŭ modesta kompare kun la vasta kanvaso, sur kiu evoluas la nuntempa lingvouzo. La jena Oficiala Aldono volas ŝanĝi tiun situacion kaj fiksi la formon de multaj tiaj vortoj surbaze de raciaj principoj kaj de uzo konstatebla ĉe bonaj aŭtoroj.

## Lingvaj festivaloj valoras por konigi lingvan diversecon

La uzantoj de la retejo <linguafest.org> estas la organizo en Parizo nomata *La Musée des Langues MUNDOLINGUA*, kiu, de tempo al tempo, amike kunlaboras kun esperantistoj. Tamen sciu, ke en la mondo de lingvo-instruado, la termino LINGUAFEST devenas de esperantistoj, kaj de la unua kaj dua Lingvaj Festivaloj de la urbo Tours en Francio.

Pri la retejo <LinguaFest.org>: ĝi devenas de esperantistoj. Mi bone scias, ĉar mi mem kreis, en Francio, la unuan asocion en Eŭropo, LINGUAFEST, kaj same kreis la retpaĝon linguafest.org en la tre fruaj tagoj de la interreto (1995, 1996).

Ĉiaokaze, mi refoje provos helpi homojn, asociojn kaj urbojn krei lingvajn festivalojn. Mi proponis labori tiudirekte al UEA, plurfoje, sed ankoraŭ oni ne montris intereson pri la afero. Eble poste.

Dennis Keefe

## Vacapa kursaro en la orienta Afriko

'Morgaŭ komenciĝos novaj kursoj por parolantoj de la angla kaj la svahila. Jam estas kreita kelka grupeto por kenjanoj. La instruado celas verajn komencantojn, kiuj scipovas la svahilan kaj la anglan. Se vi konas iun, kiu scivolas lerni, bonvolu doni al li mian vacapan numeron, kiun mi uzas por la instruado de Esperanto.

Ja certe s-ro Renato Corsetti miros legi ĉi tiun mesaĝon, ĉar taskas la Universitato Espero de Baraka per instruado al komencantoj. Tiu instruado kunlabore kun s-ino Fransŭazo Oazo kaj s-ro Renato lernigas min pri nova metodo instruadi per vacapo, tre malfacila, sed helpas scii kiu lernanto dormas kaj kiun la instruisto nepre prizorgu. Mi volas apliki la saman metodon kun svahilanoj en strebado al UK-preparoj.
La numero (+243) 894 54 11 43 estas uzata nur por la instruado de Esperanto, bonvolu diskonigi ĝin al tiuj, kiuj volas lerni per la menciitaj lingvoj.

Espoir Kasati, Kongo DR

## Esperanto en tutrusia radio

En la tutrusia radiostacio 'VestiFM' okazis diskuto de ĵurnalisto Marat Safarov kun iu ĵurnalisto kun kartvela nomo pri instruado de fremdaj lingvoj en la Rusia Imperio, ekde la 18-a jarcento kaj ĝis nun. Inter ceteraj lingvoj ili parolis ankaŭ pri Esperanto, kiu estis plej amase kaj sukcese instruata kaj lernata en la 20-aj jaroj de la dudeka jarcento danke al aŭspicioj de Lev Trockij. Li planis la Tutmondan Revolucion kaj opiniis, ke ĝuste Esperanto plej taŭgas por la interkompreniĝo de la tutmonda proletaro dum la konkerado de la mondo. En la 1920-aj jaroj en Sovetunio funkciis radiostacioj, kiuj disaŭdigadis radioelsendojn en Esperanto, kaj estis eldonataj multaj periodaĵoj, lernolibroj kaj broŝuroj en kaj pri Esperanto.

Vladimir MININ

## La koloro de Bordeaux iĝas verda

Funkcias Esperanto-kurso ĉe la Universitato de Bordeaux en okcidenta Francio. https://etu.u-bordeaux-montaigne.fr/fr/news/formations/initiation-a-l-esperanto.html.
Ŝajne instruas tiu profesoro de hispana literaturo de la 17-a jarcento: https://u-bordeaux3.academia.edu/ElvezioCanonica

**DUBOURG GLATIGNY Pascal** <pascal.dubourg@cnrs.fr>

## Esperanto en hispanaj mezlernejoj

En programo de la nun okazanta Hispana Esperanto-Kongreso oni dediĉas eron al la spertoj pri instruado de Esperanto en mezlernejoj, konkrete en la Instituto Almenara de Vélez-Málaga (provinco Malago), kun partopreno de ĝiaj lernantoj. Oni devas mencii ankaŭ la kazon de la urbo Lucena (provinco Kordovo), en kies mezlernejo "Marqués de Comares" estis organizita dum la pasinta akademia jaro baza kurso de Esperanto. Estas antaŭvidite daŭrigi la sperton dum tiu ĉi lerneja jaro 2023-24. Gratulon al Fabián kaj Juan Diego, respondeculoj de la iniciatoj.

El la Bitbulteno 90.

======= vortoj: 1365 ========

**La kolekto de EKO por 2023:** https://www.ilei.info/agado/EKO.php (ĝis 50).

La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2700 ricevantoj – 1500 rekte plus plusendoj en Hungario, Italio kaj aliaj landoj.

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.:

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.